


BONA ESPERO



**Revuo de la Esperanto-
Asocio de Suda Afriko
Numero 1
2007**

La Redaktoro

Kontribuaĵojn sendu papere (prefere maŝinskribite), aŭ en elektronika formato al la redaktoro:

Poŝte:

Johan KÖHLER
P.O. Box 245
WINKLESPRUIT
4145
Respubliko de Sud-afriko

Retpoŝte: johan.kohler@gmail.com

Ĉi tiu revuo iras al la membroj de la Esperanto-Asocio de Suda Afriko (EASA). Interŝanĝe por aliaj revuoj, ĝi estas havebla de la kasisto. Ne-membroj povas aboni, skribante rekte al la kasisto.

S-ro C. Beckford
43 Fairview Crescent
MILNERTON RIDGE
7441
Respubliko de Sud-Afriko

Enhavo

La temo de la numero.....	5
Ordo el ĥaoso.....	6
Hajko/Haiku.....	9
Korespondi deziras.....	12
Japanio.....	19
Japanaj poezi-amantoj en dulingva deklamado.....	24

Redaktore

La temo de la numero

Bonvenon al nova numero de Bona Espero. La 92a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Jokohamo, Japanio ĉi-jare. En tiu ĉi numero do troviĝas kelkajn artikolojn pri Japanio. Troviĝas informoj pri la lando mem, kaj ekzemplo de la tradicia poeziformo nomata Hajko (kun angla teksto). Kiel kutime vi trovos ankaŭ novaĵojn el Esperantujo kaj la ĉiam evoluanta mondo de Interreto.

Bonan legadon!

Ordo el ĥaoso

Nova retejo *Klaku* kunigas Esperantajn elektronikajn tagĵurnalerojn

Verkis Johano Kohler
Pri Klako (<http://www.klaku.net>)

Ekde la populariĝo de l' Interreto kaj specife de la Tut-tera Teksaĵo (TTT, angle World-wide web) la ideo havi retan "hejmon" ekzistis. Eble vi memoras servojn kiel Geocities, Yahoo! kaj Excite kiu provizis senpage eblecon starigi personan retpaĝaron. Kvankam tiuj firmaoj klopodis faciligi la afero, ne ĉiuj kapablis uzi ilin, kaj personaj retpaĝoj restis ludilo de la teĥnikaj lertuloj. La ideo tamen progresis, evoluiĝis, kaj eĉ pli faciligis en la nuntempa "blogon". Blogo estas persona retpaĝo, sed eble pli ĝuste reta tagĵurnalo. Blogo permesas al homo tre facile skribi tagajn artikolojn sur persona retpaĝo. Dank' al la blogsoftvaro, artikolojn aŭtomate aperas laŭdate, kaj estas tiuj serĉebla laŭ etiketoj aŭ ŝlosil-vortoj, kiujn la aŭtoro enmetas. Kiel Yahoo! Kaj Geocities ofertis personaj retpaĝoj, multaj firmaoj nuntempe ofertas senpagajn blogojn. (vidu ĉisube).

Plu evoluado de blogoj, kompare al personaj retpaĝoj, estas la apero de *blogariloj* – tiuj estas retejoj, kiuj kolektas, organizas kaj ĝenerale kunigas blogojn. Blogariloj povas prizorgi blogojn kaj aŭ pri unu specifan temon, aŭ pri diversaj temoj. Oni eĉ socialigis la ideon, permesante al legantoj/uzantoj de la blogarilo poentigi la blogerojn, aŭ kategorii ilin. Tiel, la granda amaso de opinioj, artikoloj, humoraĵoj kaj aliaj legaĵoj filtriĝas, kaj supren venas la plej bonaj kaj interesaj de tiuj.

Ĝis nun, la esperanta blogaro ne estis rete interkonektita. Antaŭnelonge oni anoncis retejon Klaku.net, kiu unuafoje celas

kunigi la esperantista blogaro (kaj, ĝenerale, esperantistaj retejoj). Ĝi ebligas aliron al la plej novaj kaj popularaj blogeroj en diversaj kategorioj. Uzantoj de la retejo povas partopreni per kreado de uzantkonto. Poste tiuj uzantoj povas mem proponi, kategoriigi kaj poentigi artikolojn.

Kiel ĝi ekestis?

Klaku ekzistas dank' al la libera kodo de Pligg, kiu siavice estas modifo de "Menéame", projekto kreita de la majorkano Ricardo Gali. Ricardo Gali kreis "Menéame" por havi socian paĝaron simile al digg.com.

Kiel ĝi funkcias?

Klaku estas retroprogramo kiu permesas al vi publikigi artikolojn en la paĝaro kaj la ceteraj uzantoj voĉdonos aŭ klakos viajn



La plej granda labirinto sur la mondo



Sendita de ombresaco 5 tagoj antaŭe
(<http://www.chinadaily.com.cn>)

Sekcio: turismo | Etikedoj: cxinio

labirinto granda

Aerfoto de la plej granda labirinto sur la mondo. En Liaoning (Cxinio). Oni daŭras cxirkaux 1 horo, kaj gxia suefaco estas 226.780 m2. [legu pli](#) »

komentu Sendu al... Informu amikon vian Entombigu

Supre: listeron prezentita de Klaku
kontribuojn kaze ke la uzantaro taksu ilin gravaj aŭ interesaj.

Klaku prezentas al vizitantoj liston de artikoloj, kun mencio de ĝia kategorio, proponinto kaj populareco. La suba bildo montras unu listeron. La tempo de la artikolo estas "La plej granda labirinto sur la mondo" kaj estis proponita de uzanto *ombresaco*. Aldone oni povas vidi ke temas pri turismo, kaj la artikolo jam ricevis 8 voĉojn.

Maldekstre oni indikas la nombro da poentojn kiujn la artikolo jam ricevis. Klakante sur "Klaku" oni povas voĉdoni por la artikolo. Klakante sur la ligiloj sube de la artikolo, oni povas komenti la artikolon, plusendi ĝin al iu alia retservo (del.icio.us, digg, reddit, simpy aŭ Yahoo!), aŭ retroŝte informi amikon pri ĝi. Laste oni povas "entombigi" ĝin, tiu estas negative poentigi ĝin.

Kio nun?

Nepre vizitu <http://www.klaku.net> kaj malkovru mem la diversan esperantan blogaron!

Development Blog | Tools | Badges

amatomu ALPHA .COM
the south african blogosphere, sorted

All Blogs News & Politics Business Technology Entertainment Media & Marketing

Home Blog Charts Blog Directory Tags Latest Posts On Fire Trends

Lates t My Favourites Hot Posts amaRando m

You can like to shmaak it?
Get a funky shmaak this button for your blog posts
check out other **badges** and **widgets** for your blog

Zeitgeist What the South African blogosphere is talking about

24 hours 7 days 1 month

australia melissa social networking my space road safety podcast currie cup money
cfm springbok ascii art **facebook** hc
wallabies sunday times new 7 wonders of the world aussies derick bob skinstad
daily basis backline science of sport vodacom
dad spoil petra jordan reiterate content

Laymans IT support
Welcome. I've been watching a couple of the posts on the iBlog platform for the last week and there have been a couple of people posting general IT support question... in **IT Geeks**, at 17:38
 Shmaak It! | Favourite

The eyes that saw it all
Published under a Creative Commons licence by deVos. ... in **Creative Commons Photos**, at 17:16
 Shmaak It! | Favourite

Amatomu.com estas Sudafrika blogarilo kiu aperis antaŭ kelkaj monatoj

English

Hajko/Haiku

Kompilis Johano Kohler (vidu fontoj ĉ-sube)

Hajko (el japana 俳句, haiku) estas tradicia japana poeziaĵo konsistanta el 3 linioj kun entute 17 silaboj (5 – 7 – 5).

Haiku (from the japanese 俳句, haiku) is a traditional japanese form of poetry consisting of 3 lines with altogether 17 syllables (5 – 7 – 5).

Verkita en simpla lingvaĵo ĝi kutime priskribas la naturon: ofte detalojn, kiujn homoj apenaŭ perceptas.

Written in simple language, it usually describes nature: often details that people rarely notice.

Hajkoj nur priskribas, ne komentas aŭ prijuĝas. Tiel ili invitas la legantojn al meditado.

Haiku only describe, they don't comment or judge. In this way they invite readers to meditation.

Tradicia hajko estas sen titolo. La jenaj estas poemetoj en la stilo de hajkoj.

Traditional haiku are without titles. The following are poems in the haiku style.

Fonto/Source

Zne Hajkoj de Istvan Bierfaristo -> Printempaj Salamandroj

<http://www.bierfaristo.com/salamandroj.php>

Vidu ankaŭ/See also

Hajko en Esperanto

<http://www.vastalto.com/hajko/hajko.cgi>

Printempaj Salamandroj

Spring Salamanders

Pacienco

sub la folioj
salamandroj atendas
la pluvo venos

Pacience

beneath the leaves
salamanders wait
the rain is coming

Devigo

tra varmeta pluv'
allogas salamandrojn
printempa marĉo

Compulsion

Through the tepid rain
salamanders are drawn
to the springtime marsh

Mistero

rampas tra koto
la pura salamandro
enigma ridet'

Mystery

crawling through mud
the clean salamander
enigmatic smile

La marĉad'

obstine paŝas
oranĝaj salamandroj
tra varma pluvo

The marching
Obstinately marching
orange salamanders
through the warm rain

Fino
kuraĝa paŝad'
finiĝis salamandro
plata survoje

End
a brave march
finished the salamander
flat on the road

Esperantujo

Korespondi deziras...

Korespondado estas tradicia maniero renkonti aliajn esperantistojn ĉie en la mondo.

Johano Kohler

Korespondado havas multajn avantaĝojn por komencantoj. La komencanto povas skribi en Esperanto post tri aŭ kvar lecionoj kun helpo de vortaro. Jen kelkaj korespondpetoj. Legu ilin kaj respondu!



LANDO: Italujo
Urbo: Como

Familia nomo: Lucca

Persona nomo: Enrico

Naskighjaro: 1983

SEKSO: viro

NIVelo: komencanto

Profesio: studento

Interesoj: poezio, lingvoj, muziko, literaturo, filozofio

Saluton! Mi estas Enrico, filozofia-studento el Italujo... Mi estas 24-jara, kaj volas trovi novajn amikojn samideanojn...
Bonvolu skribi!

Retadreso: en.lucca@gmail.com

Anonco validu: ghis retiro

Interesa Fako:

Como [KOmo] estas urbo en norda Italio, ĉefurbo de samnoma provinco en Lombardio, situanta ĉe lago Como, ĉe la landlimo al Svisio.





LANDO: Hungarujo
Urbo: Budapest

Familia nomo: Salamon
Persona nomo: Gyöngyi
Naskighjaro: 1973
SEKSO: virino
NIVelo: komencanto
Poshtoadreso: 1152 Budapest, Kinizsi u. 154. Hungary
Profesio:
Interesoj: autoj, kuirto, bako, naturo, kudro

Mi estas 34 jaroj virino en Hungario. Mi shatas korespondi komenca kun esperantuloj.

Retadreso: denon@citromail.hu
Anonco validu: 2007-07-12

Interesa Fako

Budapeŝto estiĝis la 1-an de januaro en 1873 el la apartaj urboj Peŝto (situanta sur la orienta bordo de Danubo), Buda kaj Óbuda (nordokcidente, Óbuda signifas Malnova Buda). Ĝi situas sur ambaŭ bordoj de la rivero Danubo kaj estas la industria, komerca kaj trafika centro de la lando.





LANDO: Pollando
Urbo: Działdowo

Familia nomo: SZATKOWSKI

Persona nomo: Piotr

Naskiĝjaro: 1992

SEKSO: viro

NIVelo: komencinto

Poŝtoadreso: Piotr Szatkowski,
Krasnołaka 34, 13-200 Działdowo,
Poland

Profesio: lernanto

Interesoj: chiuj temoj, precipe
pri geografio, politiko,
historio kaj sporto

Saluton! Mi estas Petro, mi loĝas en Pollando. Mi tre ŝatus
korespondi kun vi, ankaŭ per ordinara poshto.

Retadreso: szatkowskipiotr92@wp.pl

Anonco validu ĝis: 2007-12-22

Interesa Fako:



La setlejo ricevis urban rajton antaŭ tago de festo de Maria, do 14 de agosto 1344. Urbo evoluis kaj grandiĝis pro komerco kaj metio en 16a-17a jarcento. Działdowo estis grava placo sur komerca trako de Varsovio ĝis Gdansk kaj Elbląg. Dum II monda milito en Działdowo estis kampo de malvolonta laboro, kie mortis ĉirkaŭ 10 000 da personoj.



LANDO: Svislando
Urbo: Wolfertswil
Familia nomo: Fischer
Persona nomo: Olivia

Naskiĝjaro: 1991

SEKSO: virino

NIVelo: progresanto

Interesoj: kulturo, landoj, religioj, geamikoj, lingvoj

Kiu volas **skajpi** kun mi? Mia skajponomo estas *furnario*.

Retadreso: olivia@fischer-zim.ch


Anonco validu: 2007-07-12

KIO ESTAS SKAJPO?

Skajpo (ang. Skype (pron. [skajp]) estas tujmesaĝilo kaj interreta telefono-reto kiu funkcias per samtavola komunikado. La reto konsistas el ĉiuj samtavolaj komputiloj uzantaj la necesan senpagan aplikaĵon, elŝuteblan el la interreto. Uzanto povas senpage paroli kun aliaj Skajp-uzantoj, page telefoni al normalaj telefonoj (SkypeOut), page akcepti telefono-vokojn el normalaj telefonoj (SkypeIn), kaj page akcepti mesaĝojn el sia propra telefono-respondilo. Oni povas babile kaj komuniki ajnlingve, inkluzive per Esperanto.



Ĝi estas sufiĉe vaste uzata de Esperantistoj tra la mondo, kaj la programinterfaco inkluzivas "Esperanto"n en la listo de lingvoj (per kiu oni povas serĉi eventualajn kunbabilontojn). La diskutogrupo Skajpanoj havas pli ol 210 membroj, kiuj jam esperantigis la interfacon de Skype, kaj aranĝas demonstrojn de la programo por diversaj grupoj.



LANDO: Brazilo
Urbo: Juazeiro do Norte

Familia nomo: Alencar
Persona nomo: Farley
Naskighjaro: 1967-04-17
SEKSO: viro
NIVelo: komencinto
Poshtoadreso: Rua Pres. Vargas, 157 - Salesianos – 63050
-090 - Juazeiro do Norte - Ceará - Brasil
Profesio: Ekonomisto
Interesoj: Diversaj

Mi estas 40-a aĝa esperantisto. Mi deziras amikojn el la tuta mondo, ne gravas sekson aŭ aliajn. Mi volas praktiki Esperanton kaj fari multajn amikojn.

Retadreso: tiofarley@hotmail.com

Anonco validu: 2008-05-29

Interesa fakto:

Juazeiro do Norte situas la ŝtato Cearao (Ceará) en la duon-dezerta nord-orienta regiono de Brazilo nomata "sertão". Pluvas tie inter 500 kaj 800 mm jare. En Cearao estas du urboj kun vigla Esperanto-Movado: Fortaleza kaj Krato. Vidu la retejon <http://www.esperantoceara.org.br/>





LANDO: Azerbajghano
Urbo: Tabriz

Familia nomo: Jafari

Persona nomo: Majid

Naskighjaro: 1979

SEKSO: viro

NIVELLO: progresanto

Poshtoadreso: English Depat, UM

Profesio: Studento

Interesoj: Lingvo, Literaturo, Kulturo, Filmo, Sporto, Muziko

Mi estas studento de PhD de Angla Literaturo en UM,
Malajzio. Deziras korespondi kun samideanoj pri ĉio.

Retadreso: ab5648li@yahoo.com

Interesa fakto:

La Azerbajĝana manato aŭ mallonge manato estas la valuto de Azerbajĝano. Unu manato (simbolo dekstre) estas dividita je 100 gepikoj (aŭ gopikoj). manato estis enkondukita en 1992 kaj ekzisti ĝis komence de 1994 paralele kun la soveta rublo. Komence de 1994, manato iĝis la sola landa valuto. Lokaj mallongigoj de manato estas ankaŭ A.M. La manataj banknotoj ekzistas en tipoj: 1, 5, 10, 50, 100, 250, 500, 1.000, 10.000, 50.000.



Japanio

Japanio estas la gastiganto de la 2007^a Universala Kongreso. Ni lernu pli pri la lando kaj lingvo.

Kompilis Johano Kohler

Geografio

La japana insularo konsistas el kvar grandaj insuloj (Hokajdo, Honŝu, Ŝikoku kaj Kiuŝuo). Vicordo de nordo al sudo) kaj proksimume 3.600 malgrandaj. Sur areo de ĉirkaŭ 378 mil kvadrataj kilometroj vivas proksimume 127 milionoj da homoj. La japana insula ĉeno etendiĝas de nordo al sudo kaj prezentas formon de arko. La plej norda ekstremo de la ĉefaj insuloj situas ĉe norda latitudo de ĉirkaŭ 45 gradoj, la plej suda punkto ĉe latitudo de 30 gradoj. Pli malgrandaj insuloj troviĝas eĉ pli sude.

Pro tio la klimato montras grandajn diferencojn: En la nordo regas modere malvarma klimato, en la sudo subtropika. Proksimume 75 centonoj de japanio estas montaroj kaj montetaj areoj. Arbaroj kovras 67 centonojn de la tersurfaco. Japanio havas ĉirkaŭ 200 vulkanojn. Malfortaj tertremoj okazas tre ofte. De tempo al tempo fortaj tertremoj kaŭzas morton de multaj homoj kaj grandajn damaĝojn.

Lingvo

La japana lingvo estas la nacia lingvo de Japanio. Ĝia karaktero montras simplan fonologion, tre malsimplan esprimaron pri respekto kaj mildeco, kaj vortordon SOV kun postpozicioj.

La sola konata parenco de la japana estas la rjukjua (Ryūkyū) lingvo, parolata en la Rjukjuaj Insuloj sudokcidente de la ĉefaj insuloj de Japanio kaj ofte rigardata kiel dialekto de la japana. La rjukjuaj dialektoj estas pli-malpli interkompreneblaj inter si, sed

kune ekdisiĝis el la prajapana antaŭ unu ĝis du mil jaroj, kaj ne plu estas interkompreneblaj kun la norma japana. Tamen, la rjukjua neniel lumigas la praoriginon de la prajapana, kiu restas plu mistera.

La japana estas lingvo de la speco SOV (subjekto-objekto-verbo). Kutime por tia lingvo, ĝi havas ne prepoziciojn kiel la hindeŭropaj lingvoj sed postpoziciojn kiuj troviĝas post la modifato. La substantivo ne flekciĝas, sed ĝin sekvas postpozicio por montri frazrolon. Simile al la ĉina kaj la korea lingvoj, plurnombro estas nedeviga. La verbo flekciĝas laŭ finiteco, neeco, kaj mildeco. Adjektivoj en la japana estas stataj verboj.

La japana entenas multege da vortoj pruntitaj el la ĉina lingvo tra la jarcentoj. Eĉ la bazaj numeraloj estas ĉinaj:

<i>iĉi</i>	<i>ni</i>	<i>san</i>	<i>ŝi</i>	<i>go</i>	<i>roku</i>	<i>ŝiĉi</i>	<i>haĉi</i>	<i>kju</i>	<i>ĝu</i>
1	2	3	4	5	6	7	8	9	10

Ili tamen ekzistas paralele kun la indiĝenaj numeraloj:

hitocu, hutacu, miccu, joccu, icucu, muccu, nanacu, jaccu, kokonocu, to (unu, du, ... dek)

Ekde la 16-a jarcento la japana pruntas vortojn ankaŭ el la eŭropaj lingvoj. Dekomence el la portugala kaj la nederlanda, kaj nuntempe precipe el la angla. La uzon de la angla kiel fonto de novaj vortoj helpas tio, ke de kelkaj jardekoj preskaŭ ĉiu japana lernanto studas la anglan dum kelkaj jaroj. Tial, angleca neologismo estas sufiĉe komprenata por fariĝi ofte uzata. Eble pro la longdaŭra uzo de la ĉina skribsistemo, japanaj vortegoj kutime mallongiĝas al aĵoj de kvar moraoj: pāsonaru konpyūta (el angla "personal computer") -> pasokon.

Skribo

La japana skribiĝas per kvar (iomete ankaŭ kvin aŭ ses en specialaj cirkonstancoj) diversaj skribsistemoj:

1. Ĉinaj signoj (kanzi): signoj pruntita el najbara Ĉinio ekde proksimume la kvina jarcento. La ĉinaj signoj ofte prononciĝas plurmaniere, ĉar ili estis pruntataj kaj laŭ signifo, kaj laŭ sono, kaj por ĉindevenaj pruntvortoj. Ekzistas 1945 normigitaj ĉinaj signoj, kiujn ĉiu japana infano devas lerni, sed miloj da pliaj ekzistas.
2. Rondaj kanaoj (hiragana): signoj, kiuj reprezentas silabon, aŭ pli precize moraon. Ili baziĝas sur kursivaj formoj de ĉinaj signoj, kaj oni skribas per ili gramatikajn finaĵojn kaj postpoziciojn, kaj japanajn vortojn por kiuj ne ekzistas (normigitaj) ĉinaj signoj.
3. Strekaj kanaoj (katakana): signoj, kiuj same reprezentas moraon, sed kiuj baziĝas sur simpligitaj pecoj de ĉinaj signoj. La du kana-sistemoj nombriĝas je po 46 simboloj. Oni uzas strekajn kanaojn precipe por skribi moderntempajn pruntvortojn, fremdlingvajn nomojn, kaj onomatopeojn.
4. Latinaj literoj (rōmazi): Oni ankaŭ povas skribi la japanan per la latina alfabeto. Tia skribo uziĝas precipe en dokumentoj, vojmontriloj, kaj lernolibroj por fremdlingvanoj. Ne ekzistas unusola ĉie-uzata latinliteriga sistemo. Tial uzi latinajn literojn senerare povas esti iom malklara afero. Ĉi tie prezentiĝas latinliterigo pli-malpli laŭ la oficiala sistemo Kunrei (japane 訓令 - direktivo) aŭ Monbusyo (japane 文部省 - kultura ministerio), sed ankaŭ plejofte uzata estas la Hepburn-a sistemo. La sistemo Kunrei estas malofte uzata eĉ en Japanio, ĉar estas malfacile legebla por neparolantoj de la japana: ankaŭ la oficialaj retejoj de la japana registaro uzas la hepburnan. Tamen, ĝi estas pli konciza ol la sistemo Hepburn, kaj tial estas ĝenerale uzata por klavarumado en la japana en komputiloj. La vorto "mi" estas skribita "watashi" laŭ la sistemo Hepburn, kaj "watasi" per la latinigo Kunrei, kaj prononciĝas Ŭataŝi.

5. Arabdevenaj nombrosimboloj: uzataj kvankam japana skribo ankaŭ uzas la ĉinan nombrosimbolaron
6. Grekaj literoj: troveblaj en la sciencoj kaj en formuloj

Japanaj vortoj je Esperanto

Interalie troviĝas:

aikido, animeo, bokeo, bonzo, cunamo, ĉanojo (tradicia te-ceremonio), daimio, eno, goo, hajko, harakiro (harakiri, honora sinmortigado de samurajo), haŝioj (manĝbastonetoj), hibakuŝo, ĵudo, kamikazo, karaokeo, karateo, katano, kimono, mangao, ninĵao, Nipono (sinonimo de "Japanio"), noo, origamio, sakeo, samurajo, sudoko, sumoo, suŝio, sojo, ŝamiseno, Ŝinkanseno, ŝintoo, ŝogio, ŝoguno, tatamo, tankao, tofuo, tokusacuo, udonoj (nudeloj), utao, zorioj, zumioj

**Esperanta
Esperanto prononco de la
japana**

La japana

Bonan matenon!	Ohayoo!	おはよう
Bonan tagon!	Konniĉiwa!	こんにちは
Bonan vesperon!	Konbanwa!	こんばんは
Bonan nokton!	Oyasuminasai!	おやすみなさい
Saluton! Mi estas Tanaka.	Konniĉiwa! Tanaka desu.	こんにちは！ 田中です
Kiel vi fartas?	Gokigen ikaga?	ご機嫌いかが？
Mi fartas bone!	Ee, iiwa.	ええ、いいわ
Dankon!	Arigatoo	ありがとう
Ne dankinde!	Doo itaŝimaŝite.	どういたしまして
Ĝis revido!	Sayoonara!	さようなら
Feliĉan novjaron!	Sinnen omedetou!	新年おめでとう
Ĝojan Kristonaskon!	Kurisumasu omedetou!	クリスマスおめでとう
Feliĉan ramadanon!	Ramadan-iri omedetou!	ラマダン入りおめでとう

Esperantujo

Japanaj poezi-amantoj en dulingva deklamado

Libera Folio (<http://www.liberafolio.org>)

Dimanĉe inter 16.00 kaj 18.00 poezia aranĝo okupis la atenton de ĉirkaŭ 150 plejparte japanoj plejparte neesperantistaj en kromkongresejo Eroŝenko. Unu el la plej grandaj nuntempaj japanaj poetoj, Tanikawa Shuntaro, sampodiis kun Spomenka Ŝtimec kaj István Ertl. Tanikawa Shuntaro ekinteresiĝis pri Esperanto, leginte freŝajn japanajn tradukojn de poemoj de William Auld.

En la unua horo estis voĉlegitaj 13 poemoj, 3 de Tanikawa, kaj 10 de espaj poetoj: de Auld, Baghy, Mattos, Mao Zifu kaj Ertl, ĉiam alterne japane kaj Espe. Tanikawa mem legis ne nur siajn poemojn, sed ankaŭ po unu de Baghy kaj Auld. Oni do povas ridete diri ke nacia poeto de Japanio deklamis/deklaris, interpretante Baghy: "estas mi eperantisto"...

En la dua horo podia diskuto inter Tanikawa, Ŝtimec kaj Ertl priis, en vigla pingpongado, demandojn ekde "kiel Esperanto estas uzata en interreto" ĝis "Kio estas poezio". Sinsekve interpretis Kitagawa Hisashi, Usui Hiroyuki kaj Izumi Yukio.

La ekinteresiĝo de Tanikawa pri la Esperanta kulturo estas dankebla al la, laŭ li, bonegaj tradukoj de USUI Hiroyuki el poemoj de Auld, kiuj ĵus aperis libroforme, en 600 ekzempleroj. Alia fadeno estis stimulado de konatino lia, profesorino kiu

eklernis Esperanton ĝuste el lernilo de Spomenka Ŝtimec.

Ŝtimec surloke estis intervjuata de televido, kaj povis trafe menciigi sian dramon pri la vivo de Verda Majo. (Verda Majo estis la plumnomo de Hasegawa Teru, japana verkisto, kiu en 1936 pro Esperanto ŝi konatiĝis kun Liu Ren, ĉina studento en Tokio, kaj edziniĝis al li en la aŭtuno de la sama jaro. La geedzoj sekvajare translokiĝis al Ĉinio, kaj dum la japana okupacia milito en Ĉinio ŝia japanlingva disaŭdigo havis grandan influon al la invadaj trupoj.)

Post la publika parto, Izumi Yukio regalis la podianaron en ĉina restoracio, kie la poezia kaj cetera babilado plu daŭris la tutan vesperon.